## INTERNACIA UNUIĜO DE LA ESPERANTISTOJ-FILOLOGOJ (I U E F)

La Unuiĝo estas fondita en 1963 dum la 48-a UK en Sofio. Ĝi estas sekcio de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE).

Laŭ la Statuto la Unuiĝo havas jenajn celojn:

a) Unuigi la esperantistojn-filologojn el ĉiuj landoj por kunordigita laboro pri filologiaj temoj kaj por reciproka interhelpo en iliaj sciencaj okupoj.

b) Entrepreni studojn kaj esplorojn pri esperantologiaj temoj.

c) Organizi kolektadon de folkloraj kaj lingvistikaj materialoj el diversaj nacioj.

d) Manifesti antaŭ filologiaj eksteresperantaj medioj la rezultojn de sia agado kaj la avantaĝojn de Esperanto por internacia scienca kunlaborado.

La vorto „filologio" por la Unuiĝo havas signifon, formulitan en la Plena Ilustrita Vortaro jene:

„Scienco, kiu helpe de la historio, literaturo, arkeologio, mitologio, folkloro esploras la lingvojn kiel organojn de la spirita vivo de la popoloj.

La Unuiĝo konsistas el regulaj, kunlaboraj kaj helpaj membroj. **Regula** membro povas esti ĉiu filologo kun supera filologia klero; ankaŭ ĉiu membro de la Akademio de Esperanto rajtas esti regula membro. **Kunlabora** membro povas esti ĉiu esperantisto ne havanta filologian kleron, sed interesema pri filologiaj demandoj kaj deziranta helpi ĉiamanire la laboron de la Unuiĝo. **Helpa** membro povas esti ĉiu studento de filologia disciplino.

La jara kotizo estas: por regulaj membroj 10 steloj (aŭ 8 respondkuponoj), por kunlaboraj kaj helpaj membroj 5 steloj (aŭ 4 respondkuponoj).

En la fino de 1970 jaro la Unuiĝo konsistas el 86 regulaj, 51 kunlaboraj kaj 1 helpa membroj el jenaj landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britlando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Francio, GDR, GFR, Hungario, Indonezio, Japanio, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Sovet-Unio, Svislando, Taivano, Usono, Venezuelo.

La Gvida Komitato konsistas el 7 membroj: Atanas D. Atanasov (prezidanto), Violin Oljanov (vicprezidanto), S-ino Rajna Konstantinova (sekretariino), F-ino Ljudmila Paspaleeva (kasistino), Kunĉo Válev, Francisko Simonnet kaj Detlev Blanke. Kontrolanto: Dimitr. Simeonov.

La adreso de IUEF estas: A. D. Atanasov, str. Poptomov 48, Sofia (Bulgario).